# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**




**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**




PLENUMITA 11/11/2021 Kvincentkvindeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

****************************************

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

****************************************


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

****************************************

## Entute 807,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **283,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **224,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **194,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde marto 2022)

****************************************

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

****************************************



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Esperanta Retradio**

**Finnoj kreas artefaritan kafon** 3/11/2021


****************************************

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 60 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Demandoj: A). Kiun funkcion havas gramatika komplemento?
B). Kiu vortspeco plej ofte la epiteto estas?
C). Kiuj aliaj vortspecoj la epiteto povas esti?
Ĉ). En "Ni manĝas la prunojn kuiritaj", kiel la vorto "kuiritaj" nomiĝas gramatike? Kaj ĉu ĝi estas epiteto?

2). La dua speco de komplemento, nomata suplemento, konsistas el prepozitivo, kiu ja estas plej ofte substantivo post (kaj kun) prepozicio, ekz. "la birdo SUR LA TEGMENTO" kaj "la domo FINE DE la strato".

Kontraŭe al la rusa suplemento, kaj tre ofte al la franca epiteto, en Esperanto la suplemento ĉiam sekvas sian determinaton (birdo, domo).
La prepozicia parto de la suplemento kelkfoje estas kombinita prepozicio (fine de) kaj ege malofte aperas nur kiel akuzativo (la retroveno LA HEJMON).

Demando: En kiuj partoj de la propozicio la determinato (= difinato) de suplemento povas troviĝi?


Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 556. *Marcel Leereveld.*

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* View Email in Browser (enudgemail.com.au)
*The Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.
*Green Party* Eble? sed ili ne tiel klare esprimas sian kontraŭon *Roger Springer*

## Kial do la homa raso malkreskas?




La kialo pro kiu la homaro formortas, estas simpla. Homoj estas la kialo pro kiu homoj formortos de nia planedo. **Ni ne havas sufiĉe da beboj**. La anstataŭiga indico estas la nombro da infanoj, kiujn ĉiu paro devas averaĝe havi por konservi tutmondan populacion je konstanta nivelo, estas 2.1. Beboj kostas multon da mono, kaj malriĉigas la gepatrojn. Nun estas facile seksumi sen generi infanon. Tro da homoj elektas tiun estontecon. La mondo nun ne havas tro multajn homajn problemojn, sed male, la homaro foriĝos de la mondo. Do la mondo ne bezonas militojn, malsategojn, malamojn, ktp por malpliigi la popolacion. *Roger Springer*

## Kovidmalsanaj traktadoj

Ne nur efika frua traktado de kovido kun aliaj medikamentoj estis malpermesita de la oficialaj medicinaj normoj de praktiko tra Usono, sed nura parolado pri ĝi estis malpermesita, precipe de la YouTube-aplikaĵo de Google.

In a Dark Wood - Titanic Lifeboat Academy *Roger Springer*

# Esperanto-Sumoo

En la korona erao Esperanto-Sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto. Tuj sendu vian aliĝon al mi.

Baldaŭ la novembra sumoo (la 72a Sumoo) komenciĝos la 14an de novembro (du semajnoj). Mi atendas vian aliĝon.

Sendu jenajn datumojn:

1. Viaj sumoo-nomo kaj vera nomo kun sekso
2. Libro, kiun vi legos
   (1) Titolo (2) aŭtoro (3) eldonejo
3. Kiom da paĝoj vi legos por unu tago

Bonvolu varbu viajn konatojn al la sumoo. Precipe oceanianojn kaj afrikanojn.

HORI Jasuo
371-0825 Japanio, Gunma, Maebaŝi, Ootone 2-13-3
Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp sendas *Heather Heldzingen*

# Esperanto-kvizo

" Amuza kvizo kontribuas al serioza esplorado. UEA kunlaboras kun Ella Gryf-Lowczowska, 23-jara studento de la Universitato de Bristol, en ŝia magistriĝa tezo pri la uzo de Esperanto kiel studokazo por la disvolviĝo de algoritmoj kapablaj "lerni" gramatikon. Por tio ŝi bezonas, ke esperantistoj helpu per respondado de esplorkvizo, kiu proponas frazojn kun mankantaj afiksoj, kiujn la respondantoj devas indiki el donitaj opcioj laŭ siaj juĝoj pri la plej taŭgaj. Por respondi oni devas aliri la jenan ligilon: https://mallonge.net/ella (temas pri formularo ĉe Guglo). Ĉiuj respondoj estos anonimigitaj. Flueco en Esperanto ne estas postulata por respondi, nur bazan komprenon pri la gramatiko kaj sistemo de afiksoj de Esperanto. Ella Gryf-Lowczowska magistriĝas pri komputila neŭroscienco ĉe la Universitato de Bristol. Multaj algoritmoj ŝajne "lernas" lingvojn per statistika inferenco, do povus sukcese antaŭvidi la afikson uzendan kun iu radiko post ripeta rigardado de similaj frazoj, sed ili ne povas etendi la subkomprenatajn gramatikajn regulojn al antaŭe nerigarditaj nesimilaj frazoj. Ili ne "komprenas" la lingvon kiel la homoj. La algoritmoj kreitaj de Ella celas "lerni" la gramatikajn regulojn de Esperanto. Ŝi uzos la homajn reagojn al kvizoj por kompari kaj taksi la sukcesan funkcion de la algoritmoj. UEA antaŭdankas nome de Ella pro la partopreno en la kvizo, kiu estas amuza kaj facila.

Fernando Maia Jr., Universala Esperanto-Asocio, Vicprezidanto "


Stefan McGill sendis tiun artikolon kaj eble viaj legantoj ŝatus partopreni.

Sendas al AE *Heather Heldzingen*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). A). Ili aldonas ekstran signifon al la determinata(j) vorto(j).
   B). Adjektivo.
   C). Adverbo.
   Ĉ). Propozitivo; kaj jes, ĝi estas epiteto ĉe subkomprenata determinato "prunoj".
2). En la subjekto, en la objekto, kaj en la adjekto (kaj kelkfoje en la predikativo). *Marcel*






La aŭtoenirejo por kvar domoj. Antaŭe mi sole prizorgis ĝin. Mia antaŭa ĝardeno. Foto el aŭtoenirejo.

# Ĉu kulpigi helpantojn de la viruso?

**KRITIKO ANTE AL MIA KULPIGO DE VIRUSHELPANTOJ.**

Krom en sia unua alineo en kiu ŝi kritikas min kvankam mi diris la samon kiel ŝi, en la resto de ŝia artikolo Franciska kritikas mian deziron komplete forigi la viruson sur la ialo ke ŝi deziras diversecon ("Mi preferas vivi en mondo, kie unueco en ĉio ne estas celata"). Mi neniom kontraŭis tiun diversecon nek la homojn kiuj havas malsamajn opiniojn pri kiel kontraŭi kaj vivi kun la viruso: mi deziris la neekziston de tiuj homoj kiuj konscie malhelpis la registaron kiam ĝi postulis obeon al sia dekreto ke certaj homoj restu hejme dum certa tempo. Tiuj malobeantaj virusohavantoj kaŭzis la grandan disvolviĝon de la viruso kaj la morton de multaj homoj de kiuj viruseksplodo kaj de kiuj mortoj kulpas la neobeantoj de tiu speciala kazo. Ne temas pri la homoj kiuj havis malsamajn ideojn pri kiel militi kontraŭ la viruso ĝenerale, kiel tiuj kiuj preferas ne vakcinati. Franciska ja certe ne deziras tiun diversecon kiu intence mortigas homojn. Kaj tial mi akuzis tiujn specialajn regulomalobeintojn. Aŭ ĉu ŝi deziras la variecon ke almenaŭ kelkaj aliaj homoj havu la rajton, pro diverseco kaj demokrateco, mortigi intence min aŭ ŝin aŭ iun ajn? Same tiel mi kulpigis la kelkajn, sed relative multajn, kiuj malobeis la registaran ordonon en tiu kulpeca kazo. *Marcel Leereveld*.



# 3ZZZ



Inter aliaj ,la temoj de la la elsendo de la 8a de novembro estas la naturo , ĉevaloj, papagoj kaj memoraĵoj de nia aŭstralia fama verkisto , Trevor Steele

*Franciska Toubale*

Kara Roger!

Ĉar mi ege ŝatas kaj admiras vian majstroverkon: “Aŭstraliaj Esperantistoj”. Mi permesas al mi sendi al vi tiun ĉi tre ege seriozan historieton. Mi avertas vin, ke ĝi estas treege malĝojiga, ne surprizos min, se la plej multaj el viaj legantoj ploros, eĉ pli ol ploregos ĝin leginte!

Jen ĝi!

## Seriozan historieton

Iun belegan printempan tagon promenis juna patro kun sia kvinjara filino. La etulino estis en bonega humoro kaj senĉese faris demandojn pri ĉiu kaj ĉio, kion ili vidis dum la promenado. Ŝi demandadis pri ĉiuj homoj, pri ĉiuj hundoj, pri ĉiuj domoj, pri ĉiuj arboj, fakte pri ĉio, kion ili vidis, ĝis ŝia kompatinda patro tute ne plu povis respondi al pli el ŝiaj demandoj.

“Ĉu vi scias”, li ruze ŝin demandis, ke iam mi konis katon. Ĝi estis same scivolema kiel vi. Ĝi lernis el tio, kion oni diris al ĝi, ke se ĝi ne ĉesos sian neniam finantan demandadon, ĝi riskos ke io tre malbona povos okazi al ĝi. La kompatinda, sed bona kato, demandis ankoraŭ nur unu demandon. Post tio ĝi falis mortinta sur la teron.

La scivolema knabino iris silente preskaŭ kvin minutojn. La patro fiere kredis, ke li estas treege saĝa, eĉ saĝega. Sed tiam la demandema knabino diris: ”Ĉu mi rajtas demandi ankoraŭ nur unu demandon, bonega kaj saĝa Paĉjo mia?

La patro, kiu nun sentis sin tre feliĉa, eĉ iomete fiera, respondis: “Jes, filineto mia, kompreneble vi rajtas! “Kion vi deziras scii?” Kaj la nun eĉ pli feliĉa knabino respondis: “Paĉjo, kio estis tio, kion la kato deziris scii?”



Plejege amike, eĉ amikege, *Bob Felby*

